# Invito al kunlaboro sur la konstrufaka tereno

Jan Werner

Plurajn jardekojn mi atendas, ke aperos kolektivo de miafakuloj, kiu scipovos formi agopretan organizaĵon, kiu utile praktikos Esperanton profite al la membroj mem kaj ankaŭ utile por la ideo de neŭtrala lingvo internacia. Vane.

Okazis kelkaj provoj. Fine de la kvindekaj jaroj de pasinta jarcento arkitekto Vladimir Štrucelj el Zagrebo (HR) klopodis organizi arkitektojn kaj konstruistojn en ISAKE (Internacia societo de arkitektoj kaj konstruistoj-esperantistoj). Mi posedas ĝian provizoran adresaron el marto 1958 kaj „Oficialan Informilon de ISAKE“, la 1-an numeron el julio-aŭgusto 1959, la 2-an el junio 1960 kaj la 3-an el aŭgusto 1961. La lasta signo de ISAKE ĉe mi estas la letero de V. Štrucelj el 1962-12-26, per kiu li dankas al mi por mia faka teksto, cetere la unua, pri konstrumaŝinoj kaj invitas min al la kunsido de ISAKE en la 48-a UK en Sofio (1963). Sen konkretaj agad-rezultoj la societo poste silentiĝis kaj malaperis preskaŭ senspure.

La nuntempa TAKE (Tutmonda asocio de konstruistoj esperantistaj), spite la deklaratan „tutmondecon“, spite la seriozan penadon de la loka skipo en Alzaco (FR), ne prosperas, preskaŭ neniu membro estas kompleza fake apliki Esperanton, dum jaroj mankis artikoloj por la asocia gazeto „La Domo“. Laŭ la decido de la ĝenerala membrokunveno de TAKE, la eldonado de la gazeto estis fine de 2004 ĉesigita. Kvankam membro, mi ne scias kiomaj ni en TAKE estas. Plurajn jarojn funkcias 7-membra Terminologia Komisiono de TAKE, sed tute sen konkreta labor-rezulto, miascie neniu termin-problemo estis tie solvita.

Mi ankoraŭ reiras al la jaro 1966, kiam en la Budapeŝta UK iniciate de hungaraj teknikistoj fondiĝis Teknika Ligo. En ties komitato mi reprezentis Ĉeĥoslovakion, cetere estis en ĝi reprezentitaj pluraj Eŭropaj landoj, ne nur t.n. socialismaj. Du jarojn ni diskutis pri organizaj aferoj, precipe pri la statuto. Mi rememoras, ke oni intencis la Ligon venigi sub la ŝildon de ISAE, sed antaŭ ol la komplika organizado finiĝis, la iniciato iel forperdiĝis. Tamen la loka hungara movado de fakuloj post la UK en la jaro 1966 ekfloris, lanĉitaj estis iniciatoj en internacia skalo kaj realiĝis pluraj utilaj projektoj. Pluraj nomoj de tiamaj iniciatintoj aperas en la movado eĉ hodiaŭ.

La Budapeŝta UK grave influis agadon de teknikistoj ankaŭ en Ĉeĥoslovakio. Tuj pos la UK la Praga arkitekto Josef Drlík kaj mi fondis Teknikistan Sekcion. Ĉar estis danĝere organiziĝi en totalisma ŝtato, ni la sekcion formale subigis al la Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato, konsulta organo de la ŝtata Kleriga Instituto en Prago. La Sekcio, vastiĝinta al Scienca-Teknika Sekcio, laboris serioze kaj en la jaro 1969 ĝi jam havis 200 membrojn, fakulojn el diversaj sektoroj de scienco, tekniko kaj metioj. En la jaro 1968, pro la politikaj okazaĵoj nomataj la „Praga printempo“, la reĝima premo mildiĝis kaj en 1969 ĉeĥaj esperantistoj eluzis la atmosferon kaj, malgraŭ la ĉeesto de okupanta sovetia armeo, fondis Ĉeĥan Esperanto-Asocion. La organizaĵo de esperantistaj sciencistoj kaj teknikistoj memvole aliĝis al ĝi. Post la politikaj eventoj aŭtune 1989, post forigo de la komunisma reĝimo, la sekcio ekstagnis. La Asocio, anstataŭ serĉi manieron, kiel helpi restarigi la sekcian komitaton, malgraŭ mia persona laŭstatuta protestado, la sekcion likvidis. Bedaŭrinde.

Krome mi partoprenis organizadon de TEC (Terminologia Esperanto-Centro), kiu en certa etapo de evoluo transiris al UEA. Mi ne partoprenis en gvida funkcio, sed mi de proksime sekvis la agadon, teorie bone preparitan, sed sen serioza gvido, eĉ sen unupersona respondeca estro. TEC eksilentis post la UK en Vieno 1992 pro nesufiĉe okupitaj postenoj en la organiza strukturo kaj finfine ankaŭ pro nekvalifikita sinteno flanke de UEA. Kvankam mi legis kaj aŭdis, ke TEC restartas, mi ne kredas tion, TEC ja ne povas ekzisti kaj labori nur pere de iu interreta diskutforumo.

Nuntempe mi estas skeptika koncerne oficialan organizon por faklingva aplikado kaj terminologio. Mi spertis, ke esperantistaj fakuloj ne scias labori en kolektivo. Krom du-tri esceptoj, literaturaj kaj terminaraj kompilaĵoj estas verkoj de unuopuloj. Precipe ĉe terminaroj la individueco estas demonstro de naiveco.

Kion mi unue celas per tiu ĉi teksto, sendata al 12 fakuloj, ĉefe konstrufakuloj? Por TAKE mi promesis organizi kaj editori „Jarkolekton de TAKE 2005“. Mi ne kredas, ke la estraro de TAKE min provizos per fakaj artikoloj. Mi provas mem zorgi pri ili. La adresatojn mi petas, ke ili en la unuaj ses-sep monatoj (maks. ĝis la fino de aŭgusto) verku por TAKE tekston pri iu temo konstrufaka, arkitektura, aŭ pri temo el la fakoj koneksaj (geodezio, geotekniko, terlaboroj, metioj konstruaj kaj instalaj…). Informu min anticipe, kiel vi decidiĝis, menciu almenaŭ provizoran titolon kaj la enhavon koncize priskribu, menciu antaŭvidatan longecon (povas sufiĉi du paĝoj A4, pleje ĝis eble ses, sep paĝoj, depende de la temo). Desegnaĵoj estu nur nigraj, por ke preskostoj ne estu altaj.
Kion mi celas due? Konsulti problemajn nomindikojn. Esperanta faklingvo estas riĉa je neplenigitaj terminaj vakaĵoj. Tiu stato ne permesas senĝenan interŝanĝon de informoj, nek verkadon, pro neekzisto de kodifitaj aŭ normigitaj nomoj de objektoj, teĥnologioj, procedoj. Nesufiĉa faka aplikado de Esperanto kaŭzas, ke eĉ la ekzistanta faka leksiko malfacile aplikiĝas, mankas klara limigo de termin-signifoj, ankaŭ konvencioj kaj rutino. Tiun staton mi deziras kontraŭstari per establigo de neformala kaj aperta grupo de bonvolaj gekolegoj, komplezaj partopreni komunan diskuton, prijuĝadon de individuaj proponoj, nome sur la bazo de ĉies libera volo kaj decido.
La adresatojn mi petas pri konciza sciigo, ĉu ili pretas en la proksima duonjaro 2005 kontribui por la „Jarkolekto de TAKE“ kaj due, ĉu ili volas partopreni en komuna solvado de problemoj de nia konstrufaka Esperanto. Pri unu tia problemo mi informas vin aparte („kompozito“). Bonvolu informi min al la retadreso (...), kiu el vi ne estas ligita al la reto, skribu afable al la poŝta adreso: Jan Werner, Dřínová 18, CZ 61200 Brno.

Brno 2004-01-09 Jan Werner p.m.